# ESPERANTO EN INTERRETO

*pri la la ĈEA-retinformiloj*

*kaj pri Esperanto en la ĉeĥaj*

*retaj amaskomunikiloj*

*ekde la lasta ĈEA-kongreso*

*raportas koncize Pavla Dvořáková*




En la **retejo Esperanto.cz** aperis ekde oktobro 2022 **12 ĉeĥlingvaj kaj 10 esperantlingvaj artikoloj**. Pozitiva novaĵo estas, ke ĉi-foje ili devenis pli ofte ankaŭ de aliaj aŭtoroj - krom Miroslav Malovec kaj Milan Kolka de Vlasta Pištíková kaj Ladislav Hakl kaj ekde junio ankaŭ de Josef Kalčík, kiu samtempe vigligis nian kunagadon kaj donis al ĝi novajn impulsojn.

Dum la jaro estis iom post iom aktualigataj rubrikoj *Odkazy* kaj *Ligiloj*, kiujn vi estas bonvenaj vizitadi kaj uzi.

Novajn artikolojn mi diskonigis en la **paĝo Esperanto.cz ĉe Facebook**. Aperis ankaŭ fotaĵoj pri okazintaj aranĝoj, ligiloj al novaj videoj, elŝuteblaj libroj ktp. Sume mi publikigis dum la jaro **60 kontribuaĵojn**, kiuj estis plu partumataj en diversaj grupoj, inkluzive internaciajn. Tiel ankaŭ vigliĝis vizito de la ĈEA-retejo el eksterlando kaj realiĝis internacia interŝanĝo de informoj.

La paĝo ĉi-momente havas **458 ŝatantojn kaj 472 sekvantojn**, kiuj ricevadas avertojn pri novaĵoj. Se vi havas konton ĉe Facebook kaj ne ankoraŭ faris la subtenon, vi estas petataj fari tion, ĉar tio kreskigas reputacion de nia organizo.

Por la **FB-grupo Amikoj de Muzeo de Esperanto Svitavy** mi aperigis **25** aktualaĵojn rilatajn al historio kaj kulturo. Foje kontribuis ankaŭ la membroj mem, ekz. Boris Kolker aŭ Leopold Patek. La grupo nun havas **347 membrojn** el dekoj da landoj, en la lasta jaro al ĝi **aliĝis ĉ. 15 novaj** personoj.

La **FB-grupo Ĉeĥa Esperanto-Movado** nun havas **123 membrojn** kaj pozitive estas, ke la nombro kreskas. Dum la jaro petis membrecon ĉ. 18 homoj, inter kiuj nur 3 estis ĉeĥoj, do la grupo iĝas pli internacia. La membroj estas aparte petataj legi la novaĵojn kaj laŭeble fari ŝatsignon aŭ komentarion, ĉar tio subtenas senpagan aŭtomatan diskonigon.

**La paĝo de nia Esperanto-muzeo en Facebook** bedaŭrinde plu stagnas kaj atendas sian redaktoron.

Por la **retejo Muzeum.esperanto.cz** mi publikigis lastjare plejparte nur invitilojn al aranĝoj aŭ ligilojn al klerigaj videoj kaj faris aktualigon de ligiloj. Mi koncentriĝis pli pri kolekto de taŭgaj materialoj por enhavo de la nove preparata retejo en WordPress. Mi esperas, ke dank al kunagado kun la kolegoj la nova retejo povos parte servi ankaŭ kiel reta interaga informpanelo el nia muzeo kaj pli alloge plenumi sian popularigan kaj klerigan funkcion.

**La muzea paĝaro ĉe la socia retejo Ipernity**, fondita en januaro 2011, havis **ĝis nun** entute **223 000 vizitojn**. Supozata jarstatistiko estas iom sub 10 000. Dum la lasta jaro pro pluraj kialoj kaj komplikaĵoj mi alŝutis neniujn novaĵojn, sed plu por vi senpage disponeblas **pli ol 2200 multmediaj dokumentoj en pli ol 50 albumoj.** Tekstaj dosieroj elŝuteblas post simpla senpaga registriĝo.

Aparte aprezinda estas aktiveco de **Esperanto-kluboj en Brno kaj Prago**, kiuj prizorgas proprajn **videokanalojn ĉe Youtube**.

La klubo de Brno publikigis entute **30 novajn registraĵojn** de siaj diverstemaj prelegoj.

La praga klubo aperigis **14 novaĵojn**, krom prelegoj ankaŭ mallongajn specimenojn de poezio aŭ muziko.

Vi ĉiuj estas invitataj sekvi por vi interesajn videojn kaj subteni ilin per ŝatoj kaj tiel motivigi la kreantojn por plua laboro. Aparta danko pro ĝi venas al Milan Kolka kaj Tomáš Břicháček..

Stato de informoj **pri Esperanto en la ĉeĥaj amaskomunikiloj**

ne estas ĉi-jare tro ĝojiga.

Aperis ekz. **artikolo** en la reta magazino *Seniortip.cz*, du **intervjuoj kun Petr Chrdle** (en la revuo *Knihkupec* kaj *iDnes*) kaj intervjuo **kun Pavel Polnický** en *Poděbradský zpravodaj*.

**Invitilo al la muzea solenaĵo** aperis en la urba *retejo de Svitavy* kaj en formo de video en la kanalo de la regiona *televido CMS*.

En la jutuba kanalo *Právě Teď!* spekteblas valora videoprelego de Petr Chrdle „Mezinárodní jazyk esperanto jako šiřitel kultury“.

Krom tio plejparte nur mallongaj mencioj – la plej interesa estas de la framasona loĝio Dobrovský kaj intervjuo de Petr Dorůžka kun konata kantistino Katarina Cicha el Bjalistoko, kiu kantas i.a. en Esperanto.

Ĉiukaze lastjare aperis **neniu informo okaze de Esperanto-Tago aŭ Zamenhof-Tago** kaj por ni tio estas signo, ke ni kiel asocio devintus iom reaktiviĝi kaj ne plu lasi nian konfidon nur al la interesitaj redaktoroj-neesperantistoj.

La kompletigitajn informojn kun bezonataj retligiloj mi planas por publikigo en Esperanto.cz, tiel ke ĉiuj interesitoj povu facile trovi kaj uzi ilin. Se vi trovis ligilon, kiun ni ne konas, ne hezitu nin kontakti!

**Vi ĉiuj estas invitataj:**

- vizitadi la retejojn kaj komentarii la kontribuaĵojn
- diskonigi la informojn inter viaj geamikoj
- sendi fotaĵojn kaj informojn pri okazintaj aranĝoj
- event. ankaŭ sendi viajn proponojn por la artikoloj en la ĈEA-retejo kiujn ni volonte redakte finprilaboros

KONTAKTO: **redakce@esperanto.cz**.

Dankon por via atento kaj kunagado laŭ viaj ebloj!